# starto

ELDONAS ĈEĤA ESPERANTO-ASOCIO



1980·5·(81)

KOVOVÉ
METALAJ REMIZOJ
GARÁŽE

el ŝtala lado - fundamenta farbotavolo - duparta pordego - deklina tegmento - sen planko - facila muntado aŭ sur submuro aŭ sur ebena tereno

Longo 4400 mm - prezo 4840,-Kčs
Longo 5300 mm - prezo 5350,-Kčs
Longo 6200 mm - prezo 5830,-Kčs
Larĝo 3030 mm alto 2450 mm estas egalaj ĉe ĉiuj tri tipoj.

Je mendo fabrikas kaj dum malonga tempo **1-2 semajnoj liveras**

INKLEMO
PRAHA (kooperativo)

Skribajn mendojn sendu al la adreso de komerca fako: INKLEMO PRAHA, maloobchodní úsek, 190 00 PRAHA 9, Spojovací 11, aŭ telefonu al n-ro 83 09 49. Persone mendeblaj en Pragaj vendejoj de la kooperativo. Transporton ni povas certigi. Remizojn ni liveras nur al privatuloj.


# SAMAN OPINION ANKAŬ NI HAVAS

Anstataŭ la ĉefartikolo ni transprenas sub tiu ĉi nia titolo la artikolon de la presorgano de Hispana Esperantista - Asocio "Anton Balague" /n-ro 4, 2-a jarkolekto/, kiu inspiras pripensi la preparatan eventon:

L A  E Ŭ R O P A  K O N F E R E N C O

La Eŭropa Konferenco pri Sekureco kaj Kooperado okazonta en Madrido, en la venonta novembro vekas grandan atenton kaj intereson inter nia membraro.

Efektive, la verŝajne polemika konferenco tre koncernas al nia Asocio, kies celo estas labori por paca kunvivado inter ĉiuj popoloj. Kompreneble ni esperas, ke en la menciita konferenco oni sincere laboros por plibonigo de la vivo kaj paca trankviligo de la homaro.

Verŝajne la Konferenco baziĝas sur tri fundamentaj kolonoj: Sekureco, Kooperado kaj Homaj Rajtoj. Evidente la tri aspektoj de la Konferenco estas ege gravaj, sed el ĉiuj tri, la plej interesa estas tiu pri la Sekureco. Se ne estas sekureco, malaperas la kooperado kaj la homaj rajtoj malfacile povas efektiviĝi. La problemo estas, ĉu oni povas paroli pri sekureco, kiam ĉiutage oni konstante endanĝerigas la pacon? La projekto por instaligo de danĝeraj atomaj kaj neŭtronaj bomboj en Eŭropo, ne estas favora por la sukceso de la Konferenco. Nia lando ne restas for de ĉi tiu hipokrita decido kaj agado.

Nia lando, kiu gastigos la Konferencon devus meti ekzemplon, sed male, oni intencas kompromisi nian landon al militista bloko. Kiamaniere klarigos niaj reprezentantoj en la Konferenco tiun misagadon? Oni bezonas faktojn, ne vortojn. Se ni deziras restadi amikoj de ĉiuj landoj kaj popoloj, neniel ni devas akcepti armilojn kaj plej grave se temas pri eksterlandaj armiloj kaj trupoj, vere minacantaj tiujn popolojn, kiujn ni nomas amikoj.

La plej granda sekureco estas tuja kontrolo de la armiloj, kiel unua paŝo, por posta kaj ĝenerala malarmigado. Tio ja estus sekureco.

Pri Kooperado la kampo estas ampleksa. Plej bonaj rilatoj inter ĉiuj landoj. Kunlaborado por forigi la polucion, kiu minacas nian ekziston. Purigo de la marakvoj. En ĉi tiu punkto, Hispanujo atente kaj serioze devas defendi la mediteranean maron, sed ne temas unike pri purigo de la akvoj, sed ankaŭ pri malpermeso de navigacio al militaj ŝipoj kunportantaj danĝerajn armilojn precipe al tiuj ŝipoj, kiuj ne apartenas al la mediteraneaj landoj. Estas multaj aliaj temoj por kooperado inter la eŭropaj landoj. Je la fino de la konferenco ni jam konstatos, kiaj rezolucioj estis aprobitaj kaj la eblecojn - por ke tiuj rezolucioj estos vere aplikataj.

Fine, restas la kolono pri la Homaj Rajtoj. Ni ĉiuj scias pri kio temas tiu parto de la Konferenco. La reprezentantoj

de la eŭropaj kapitalismaj landoj kritikas malfavore la politikan sistemon de la socialismo. Niaj bonkoraj kapitalistoj ploras pro la malbonaj kondiĉoj, en kiuj vivas la laboristaro de la socialismaj landoj. Sed ili forgesas, ke ankaŭ la lasta mondmilito jam ekzistis en tiuj landoj dum la nomata kapitalisma sistemo, dum kiu nur troviĝis sklaveco, servuteco, mizero, analfabetoj, senlaboreco, malsato diskriminacio k.t.p.

Ne, la registaroj de la eŭropaj kapitalismaj landoj absolute ne interesiĝas pri la vivo de la laboristoj en la socialisma areo. Ili timas, kaj sendube pravas, ke iam la atingita sukceso en tiuj landoj, estos kopiata de la laboristaro kaj progresemaj fortoj de la kapitalismaj landoj kaj tiam finiĝos la privilegioj de la multnaciaj entreprenoj,monopoloj kaj trustoj.

Sendube la delegitaro hispana, kuraĝe prezentos en tiu kolono de la Homaj Rajtoj, la senlaborecon. La rajto al la laboro kaj al familia kunvivado estas ja io nediskutebla kaj de ĉiuj estas sciate, ke ili ne estas respektataj en nia lando. Estas evidente ankaŭ, ke ĉiu homo rajtas restadi en sia lando, kie estas malfacila deziro por hispana laboristo, kiu pro labormanko devas elmigri, vole aŭ nevole,al eksterlando. Facile estas vidi la pajlon en fremda okulo, sed ne la trabon en la nia.

Malgraŭ ĉiuj obstakloj, ni esperas, ke de la Madrida Konferenco oni eltiros konkludojn, kiuj aperigos nian estontecon pli hela, vivinda kaj esperiga.

## Vere malfacilas ne satiron skribi

Dum la U.K. 1974 en Hamburgo, prof. Lapenna ne estis reelektita kiel prezidanto de UEA. Anstataŭ li d-ro Tonkin estis elektita. Tiu simpla procedo, kiun elektaj bataloj antaŭiris,estas plue, do nun en la sesa jaro post la laustatuta evento, polemike traktata de la venkito. Pro tio ke malfacilas konfesi malvenkon, la venkito ŝatas aserti, ke la"miselekto"nur povis okazi pro "puĉo". Kelkaj konsentis tion. Tamen ilia nombro ne sufiĉis por povi starigi propran kontraŭ-organizaĵon. Pri ĉio, kompreneble, ekzistas "dokumentoj", kiuj estas interpreteblaj kaj interpretendaj. Tiuj estas entenitaj en la ampleksa volumo "Hamburgo en Retrospektivo". Ekde 1974 la subfosa agado estas senĉese daŭrigata. Tio okazas precipe en la revuo "Horizonto" kaj "Perspektivo", en kiuj ĉiam denove kelkaj el la malmultaj "Voĉoj de la neutrala Esperanto-movado" estas legeblaj. La super-neutraleco, por kiu prof. L. nun pledas, fariĝis unuflanka politika okcidenta politiko. Tio estis jam rimarkebla en tio, ke Lapenna,kiam li ankoraŭ estis prezidanto de UEA, ne povis vojaĝi al la U. K.1973 en Beogrado, ĉar la jugoslavia registaro malpermesis lin trapasi la limon. Tia persono,kiu ne estas bonvena en ĉiuj landoj, povas ankaŭ ne reprezenti mondan organizaĵon kia UEA.

Voĉoj kiel tiuj de prof. L. kaj de ties anoj estas kelkfoje ankaŭ transprenitaj de aliaj. Ekz. la "Swiss Press Review and News Report" en Berno, Svislando /n-ro 17/13aug79/ presis artikolon de sia eldonisto Peter Sager "Soviets infiltrate Esperanto-Movement", kiu, evidente, estis destinita ĝeni la U.K. en Lucerno. Ĝi ne havis iun eĥon, kaj pro tio ni mencias ĝin hodiau. Nek ĝi nek nia atentigo ne plu povas malutili.

La UEA-estraro neniam respondis iun atakon au kalumnion,en saĝa retenemo, sed daurigis sian aktivadon sen ia partia deviado, ekz.adaptante la statuton al la necesoj de la organiza neutraleco. La cirkonstancon, ke la disidenta rondo 1979 okazigis kunvenon en Ateno, la organo de la Helena Esperanto-Asocio, "Nia Verda Informilo" /9/1979/utiligis por fari kelkajn rimarkigojn, kiujn prof. Lapenna indigne respondis. Lia letero estis same represita en la organo de la grekaj esperantistoj /10/1979/ kaj tie ne malpli akre respondita. Speciale atentinde estas, ke prof. L. plue atribuas ĉiun kulpon je la stagnado au regreso de Esperanto en la lastaj jaroj al la fakto de sia renverso.

La batalado, kiun prof. L. faras en la lastaj jaroj kontrau la funkciuloj de UEA, evidente, havis la celon malutili al tiuj. Sed se ĝi estus estinta malutila por ili, ĝi estus trafinta ankau Esperanton mem. Pri tio la disidentoj ne konsciis au ne volis konscii. La esperantistoj, kiuj pledas por la interkompreniĝo de la tuta mondo, prezentas ĉi tie ekzemplon kiel ne konduti. Dank'al Dio, la mondo eksciaas preskaŭ nenion de tiu interfrata militeto. Tia agado estas ankaŭ tro ridinda en epoko, en kiu ne-komunistoj kaj komunistoj sidas kune en la grandaj politikaj mondorgaizaĵoj, UNo, Unesko k. a. UEA devas resti aliĝinta al ili. Esperanto devas servi al ĉiuj homoj, sen konsidero al iu partio. Do, Esperanto estas neutrala el si mem, kaj ĝiaj altaj reprezentantoj ricevas instrukciojn nek de okcidento nek de oriento.

## APLIKO DE ESPERANTO EN SCIENCO KAJ TEĤNIKO

Pritaksante la eventon en teĥnika esp.mondo, kia estis sendiskute la ekologia seminario aranĝita en la 29a - 31a de aŭgusto 1980 en Ústí nad Labem /Ĉeĥoslovakio/ zorge de scienc-teĥnika sekcio de nia Asocio, mi povas unusence konstati, ke ĝi estis ĉiuflanke sukcesa.

Estas ja konata fakto, ke la scienc-teĥnikaj laborantoj en sia plimulto esence eluzas disponeblan tempon, forĵetas pli malpli gravajn formalaĵojn kaj entute montras plaĉan ekzemplan organizan sencon.

Kaj tiamaniere estis aranĝitaj kaj okazis ĉiuj traktadoj. Krome substrekinda estis la kunlaboro de aranĝantoj kun Uzina sekcio de Ĉeĥoslovaka scienc-teĥnika societo SPOLCHEMIE Ústí n.Labem, do kun la filio de tutŝtata organizo de la plej granda ĥemia trusto de nia lando.

Elstara estis la demonstro de ĉiuflankaj eblecoj por la uzo de la Lingvo en tiu ĉi specifa, dum la samtempo tre observata sfero, tiu de la vivmedio. Por nia organizo estis ja tre agrabla fakto, ke la parton sekvis ankaŭ la reprezentanto de la Kulturdomo en Ústí n.L., kie la seminario gastis, ke la prelegojn kaj diskutojn aktive ankaŭ partoprenis fakuloj-neesperantistoj, ekz. la regiona estro de higiena centro.

La fotografaĵo montras inĝ.P.Todorov el Bulgario, kiu salutis la partoprenantojn en la nomo de UEA kaj ĉeestis ĉiujn traktadojn kiel nova membro de UEA-prezidantaro por faka laboro.

Prelegoj prezentitaj dum la seminario estis eldonitaj en komuna almanako, kiun eblas mendi en la sekretariejo de nia Asocio por Kčs 39 aŭ por 16 ned.guldenoj.

Zd.Křimský



## KOMUNA DEKLARACIO

de partoprenantoj en la seminario "Apliko de Esperanto en scienco kaj teĥniko.

La partoprenantoj, fakuloj-esperantistoj en nombro de 83 personoj el Ĉeĥoslovakio, Bulgario, Germana Demokratia Respubliko, Hungario kaj Nederlando traktis fakajn temojn de internacia karaktero en du sekcioj:

a/ La vivomedio hodiaŭ kaj morgaŭ



b/ Problemoj de faka lingvo kaj tradukado.

Niajn konstatojn kaj rekomendojn ni resumas en la deklaracio:

A.

1. La politikajn, teĥnikajn kaj ekonomiajn intervenojn por limigi kaj haltigi poluciadon de la vivomedio devas akompani celscia kaj sistemeca edukado al zorgo pri la vivomedio en ĉiuj aĝkategorioj de la homa populacio.
2. La rilato "organismo-medio" estu esplorata cele al daŭra perfektigado de sanitaraj kaj higienaj normoj, kiuj garantiu optimumajn kondiĉojn por la homa sano.
3. Sistemo de protektado de la vivomedio bezonas normojn, kontrolsistemon kaj kunlaboron sur internacia nivelo, ĉar ankaŭ la poluciado havas mondskalan karakteron.
4. Ĉar la ekologia problemaro havas internacian karakteron, oni klopodu intensigi uzon de la internacia lingvo Esperanto por ĝia solvado.
5. La evoluo de la homa socio postulas pli intensan eluzon de la nun konataj energi-fontoj, kio rezultigas novajn damaĝojn por la vivomedio. Ni rekomendas sekvi malaltigon de la konsumbezonoj de energio per teĥnika perfektigo de teĥnologiaj procedoj, per altigo de efikeco de ĉiuj teĥnikaj ekipaĵoj, per reguligado, aŭtomatizado ktp.
6. Ĉiuj procedoj kaj metodoj utilaj por restarigi kaj konservi la bonan vivomedion estu alireblaj por ĉiuj ŝtatoj sen kia ajn diskriminacio.
7. Ekologio kiel interdisciplina scienco estu rekonita kiel memstara fako; ĝi estu memstare studata kaj estu aplikata en la ŝtataj, komunaj kaj entreprenaj organizaĵoj sub gvido de kompetenta specialisto-ekologo.

B.

1. En la movado ni lastatempe konstatas gravan interesiĝon pri la fakaj aplikoj de Esperanto.
2. Pozitivaj rezultoj de la faka aplikado de Esperanto grave dependas de la evoluigo de unuopaj faklingvoj. Estas necese, ke la ĝis nun disigitaj tiudirektaj celadoj estu unuece gvidataj de la movadinstitucioj.
3. La normiga procedo de la faklingvoj en Esperanto sekvu similajn procedojn nacilingvajn.
4. Lingvo-planado kaj faklingva normigo en Esperanto estu agnoskata kiel scienco preskriba.
5. Oni gardu skemisman karakteron de Esperanto, ĉar ĝi respondas al la strukturo de la lingvo; ĝi povas esti avantaĝe adaptita al la modernaj teĥnikaj rimedoj, precipe komputiloj.
6. Ni rekomendas teorie studi la morfologiajn principojn de faklingvoj kaj eduki novajn adeptojn por la terminologia laboro.








# MOZAIKO EL LA KULTURA FESTIVALO



Jam la kvaran fojon renkontiĝis esperantistoj en Silezia centrourbo Opava en la tagoj de 12-a ĝis 14-a de septembro por vidi kaj aŭskulti programojn de la Esperantista Kultura Festivalo. Ĝi okazis enkadre de la kulturŝemajno "Opava de Bezruč" kaj estis dediĉita al honorigo de la 35-a datreveno de liberigo de nia respubliko. La negranda kolektivo da organizantoj preparis interesan kaj varian programon, kiu dum tutaj tri tagoj logis intereson de partoprenintoj. Ilia nombro ŝanĝadis - la plej nombra estis sabata vizitantaro dum la Arta vespero, kiun ĉeestis ĉirkaŭ 150 geesperantistoj. La organizantoj estis iom ĉagrenitaj pro ne troa intereso pri la festivalo inter enlanda samideanaro - ja, pli ol 40 ĉeestintoj de la IV-a EKF estis eksterlandanoj.

- - -

Ankaŭ la pli frue anoncitaj konkursoj vekis pli grandan intereson ekster Ĉeĥoslovakio. Kvankam aliĝis pli da interesuloj ol poste alveturis konkursi, eĉ tiuj estis eksterlandanoj. La rezultojn de la konkursoj legu aliloke.

- - -

Ĉiuj partoprenintoj de la IV-a EKF solene kunsidis sabaton antaŭtagmeze. Ilin salutis oficialaj reprezentantoj de Distrikta packonsilantaro, de Kultura sekcio de Distrikta Nacia Komitato en Opava, de Komisiono por "Opava de Bezruč", kaj



estro de Uzina klubo Ostroj Opava. En nomo de amikaj najbarlandaj Esperanto-organizaĵoj parolis reprezentantoj de Pola Esperanto-Asocio - mgro R. Kossakowski, de Centra Laborrondo Esperanto de Kulturligo de GDR - Hans-Jürg Kelpin, de Bulgara Esperanto-Asocio - N. Karaĝova.

La dua parto de la kunsido havis laboran karakteron kaj oni aŭskultis paroladojn tuŝantaj la praktikigon de Esperanto en kultura sfero. Parolis konata Esperanta aŭtoro kaj tradukanto Jiří Kořínek, ĉeĥa poeto Jiří Karen kaj pri polaj spertoj en la apliko de IL en muzea laboro raportis Teresa Nemere el Bydgoszcz. Tiu ĉi parto de la kunsido estis ornamita per programeto, kiun preparis kolektivo de la plej junaj esperantistoj el Opava sub gvido de s-ino J. Hoblíková.

- - -

Ĉiuj partoprenintoj de la IV-a EKF honorigis ankaŭ oferojn de la Dua mondmilito kaj de liberigaj bataloj dum komuna vizito de ĉi jare inaŭgurita Monumento de militoperacio de Ostrava, kiu situas en la vilaĝo Hrabyň. La monumentala konstruaĵo vekis grandan intereson ĉefe inter niaj eksterlandaj gastoj. Subita kaj densa pluvo malebligis daŭrigi la ekskurson al la pluaj lokoj, ligitaj kun nacia reviviĝo kaj liberigaj bataloj en Silezio.

- - -

El inter riĉa arta programo de la festivalo indas nomi memstaran koncerton de la "Ensemblo de Malnova Kanto" el Bydgoszcz, kiu kantis sub gvido de Jan Lach. Ĝi ankaŭ reprezentis esperantistajn artistojn en dimanĉa vespero dum la Koncerto de kantĥoroj de distrikto Opava, kie ĝi ĉeestis kiel gasto de la vespero. Post la festivalaj tagoj la kantĥoro forveturis ankoraŭ en Brno, kie preparis lokaj esperantistoj la publikan koncerton.

- - -





Al kelkaj esperantistoj, vizitintaj la IV-an EKF, mankis en la urbo apartaj afiŝoj, programoj kaj simile. Sed ĉi jare la organizantoj klopodis plene vicigi la festivalon en la gravan kulturan entreprenon, kiu havas oficialan karakteron kaj apogon de ĉiuj urbaj, distriktaj kaj regionaj oficoj nome "Opava de Bezruč". La intenco plene sukcesis, kaj tial en ĉiuj oficialaj afiŝoj, presaĵoj, raportoj, broŝuroj, programfolioj, estis la festivalo kaj sekve ankaŭ Esperanto menciita. Tiu fakto altigas prestiĝon de la Internacia lingvo kaj ankaŭ de nia movado.

V.K.

IV-a ESPERANTISTA KULTURA FESTIVALO

O P A V A 12.9. - 14.9.1980

K O N K U R S A J   R E Z U L T O J

Okaze de la IV-a Esperantista Kultura Festivalo estis anoncitaj internaciaj konkursoj en kantado kaj deklamado en Esperanto. La konkurso okazis en Uzina klubo Ostroj Opava vendrede la 12-an de septembro 1980 en la tempo de la 10,oo ĝis 14,oo horoj.

En la juĝkomisiono membriĝis:

Ing. Vlastimil Kočvara - prezidanto, por la organiza komitato de la IV-a EKF

Adolf Staňura - membro, prezidanto de la Lingva komisiono de ČEA

Štěpán Kotek - membro, korepetitoro de Silezia teatro en Opava

Remigiusz Kossakowski - membro, kantisto, magistro de arto Pollando

La juĝkomisiono post prijuĝo de ĉiuj faktoj anoncas jenajn rezultojn:

Konkurso en k a n t a d o: El la 6 aliĝoj aŭ sinproponoj partoprenis la konkurson 2 solkantistoj kaj unu kamera ensemblo. Ĉiuj respektis la konkursajn kondiĉojn.

La juĝkomisiono decidis - kvankam antaŭe ne antaŭvidite-dis dividi konkursintojn en du kategorioj: solkantistoj kaj kameraj ensembloj.

La prezento de la unusola pertoprenanto en la kameraj ensembloj, la dueto "Konsonanco" el Varsovio estis eminenta. La juĝkomisiono, respektante la rajton ne aljuĝi ĉiujn premiojn, se la prezentado ne respondus al altaj artaj pretendoj, konsideras la nivelon de la dueto "Konsonanco" tutresponda al la I-a premio kaj atribuas ĝin al la ensemblo.

En la kategorio de solkantistoj ricevas la unuan premion samideanino Galja Kostova el Jambol, Bulgario. La duan premion ricevas s-ano Dimitar Denčev, al kiu la juĝkomisiono atribuas ankaŭ specialan laŭdon por bona lingva prezento de muzika teksto.



La juĝkomisiono ankaŭ esprimas la rekomendon, ke la kantistoj en similaj konkursoj nepre pli bone kaj pli perfekte regu la lingvon por bone ekspliki la muzikajn tekstojn.

Fine la juĝkomisiono decidis, ke ĉiuj partoprenantoj de la okazinta konkurso rajtas prezenti sin al publiko dum la arta vespero, kiu okazas dum la IV-a Esperantista Kultura Festivalo.

Konkurso en d e k l a m a d o: El la tri sinproponoj kaj aliĝoj al la konkurso ĝis fino de ĝi ne alvenis du aliĝintoj. Sekve de tio ankaŭ la tria cedis el la konkurso. Pro tio la konkurso ne efektiviĝis.

Opava, Ĉeĥoslovakio, 11.9.1980

Informo de la organiza komitato de IV-a EKF Opava:

La organiza komitato de la IV-a Esperantista Kultura Festivalo komence de la jaro 1980 anoncis la internacian fotografan konkurson. Ĝis la limdato, t.e. 30.5.1980 aliĝis nur tri fotografistoj. La senditaj konkursaj fotografaĵoj ne plenumis la temon de la konkurso, tial estis decidite la konkurson nuligi. Pro tio la organiza komitato de la IV-a EKF instigis du fotografistojn el la esp. rondeto Ostroj Opava prezenti sin dum la festivalo per propra ekspozicieto. Ambaŭ preparis bonkvalitan ekspozicieton dum la festivalaj tagoj. Pro tio la organiza komitato esprimas al ambaŭ membroj-s-ano Josef Solnický kaj Miroslav Rybáček, honoran rekonon.

Opava, la 14-an de septembro 1980

Ing. Vl. Kočvara,
prezidanto de la Org.Kom.

R E Z U L T O DE LA KONKURSO DE PROPAGANDAJ KESTOJ anoncata de Metodika-propaganda komisiono de ČEA okaze de la 35-jara jubileo de liberigo de Ĉeĥoslovakio fare de Soveta Armeo.



La konkurson partoprenis nur tri lokaj grupoj: Praha, Poděbrady kaj Cheb. La ĵurio bedaŭras nesufiĉan partoprenon kaj interkonsentinte decidas:

1. La unua kaj tria premioj n e e s t i s atribuitaj.
2. La duan /kaj unusolan/ premion Kčs 200,- atribui al loka grupo de ČEA en Praha /86 poentoj/.
3. La ceteraj lokaj grupoj - Cheb /85/ kaj Poděbrady /65/ ricevos diplomojn de partopreno.

La ĵurio kaj metodika-propaganda komisiono de ČEA atendas el vicoj de la tuta ČEA-membraro konstruktivajn proponojn por plibonigo de pluaj konkursoj kaj de la novaj allogaj temoj.
Al la partoprenintoj la ĵurio esprimas koran dankon pro la iniciativo.

Karlovy Vary la 26-an de aŭg.1980

Jaroslav Klement,
estro de la metod.prop.
komisiono de ČEA

# internacia panoramo

INTERLINGVISTIKA-ESPERANTOLOGIA PROGRAMO EN LA POLA TELEVIDO

La 18-an de aŭgusto c.j. la Pola Televido emisiis sur ambaŭ kanaloj duonhoran koloran programon pri la problemoj de multlingveco kaj ĝiaj solvoj. La elsendaĵo titolita "Ĉirkaŭ la Babelturo" okazis kadre de aprezata cikla programo publicista - "Horizonto"-, en kiu renomaj specialistoj respondas demandojn de arigita en studio publiko pri gravaj nuntempaj problemoj. La pritraktata programo konsistis el du partoj - dekminuta kolor-filmo pri la lingvaj baroj ekde la Babel-Tura epoko kaj pri la klopodoj supervenki ilin, kaj - respondado je la demandoj.
La "eksperto" estis ĵurnalisto-esperantisto,Jerzy Uśpieński; redaktis kaj reĝisoris la programon alia konata ĵurnalisto kaj esperantisto, Roman Dobrzyński. La demandoj koncernis tre larĝan problemaron, ekde la lingva situacio afrika kaj en UNO, tra la eblaj solvoj per la naciaj "grandlingvoj" ĝis - Esperanto. Multaj demandoj /ĉirkaŭ unu triono/koncernis ĝuste la Internacian Lingvon. Tio permesis prezenti Esperanton objektive, sur la lingvistika fono, kaj kun konsidero de ĝiaj plej lastaj atingoj, ĉefe en la sferoj scienca kaj politikista. La programo elvokis sufiĉe grandan kaj pozitivan reehon. Tial oni esperas havi eblecon pli ofte prezenti la interlingvistikan-esperantologian temaron en la Pola Televido.

JOSIP BROZ TITO

En junio 1953, okaze de la 38-a Universala Kongreso de Esperanto, Tito, kiu mem iom scipovis Esperanton, diris al 4-persona diversnacia delegacio: "Mi opinias, ke la lernado de Esperanto nun estas tre aktuala. Ĝin oni ellernas multe pli facile, ol iun ajn alian lingvon. La scion de Esperanto oni povas uzi en ĉiuj landoj. Mi scias, ke Esperanto estas aparte disvastiĝinta inter la laboristoj. Por ili ĝi havas specialan signifon. Pere de Esperanto la laboristoj povas facile starigi kontaktojn kun la laboristoj en aliaj landoj."
La informilo de Kroatia Esperanto-Ligo "Tempo" eldonis specialan numeron pri Tito.
Lazar KOLIŠEVSKI, la posteulo de Josip Broz Tito, ankaŭ scipovas Esperanton. Li estis tre aktiva membro de la Esperanto-Societo en Beograd antaŭ la milito.

66-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO okazos de 25.7.-1.8.81 en Brasilia, ĉefurbo de Brazilo. Dum la antaŭsemajno okazos antaŭkongreso en Rio de Janeiro; krome la Europa Klubo aranĝos mallongan kongreson pri kibernetiko en la sama urbo.

NOVA "TEST 5000". Hermann Behrmann, estro de la Esperanto - Centro Paderborn estas komencanta novan agadon pro kreski rimarkeble la nombron de Esperanto-parolantoj. La testo konsistos el tio, ke multaj personoj ricevos la programitan lernmaterialon de H. Behrmann, nun prilaborita de Karl Trimborn, por testi ĝin. Ankaŭ vi povas subteni tiun agadon de Esperanto-Centro, Postfach 1450, D-4790 Paderborn, F.R.G.

53-a KONGRESO DE SAT. 380 kongresanoj el 18 landoj kolektiĝis en Rijeka, la plej granda havenurbo de Jugoslavio,de 19.-25.7.80. Unu el la centraj temoj de la kongreso, prezentita de la gastiganta lando, estis la evoluo de la jugoslavia memmastrado, pri kiu temo enkonduke parolis Ivan Marušič, la membro de la Asembleo de Sindikat-asocio por Kroatio. - Krom labora okazis ankaŭ distra parto de la kongreso:ekskursoj al fama groto Postojna kaj Plitvice-lagoj, perŝipa rondveturado kaj adiaŭo en fama somerumejo Opatija.

Bertalan FARKAS lernis Esperanton en la jaro 1971 laŭ la lernolibro de Julio Baghy. Bertalan Farkas, hungara piloto -kapitano, sub gvido de V.N. Kubasov, soveta kosmonaŭto - kadre de internacia esplorprogramo "Interkosmos" - la 26-an de majo sukcese startis el Bajkonur /Sovetunio/. La sekvan tagon ili renkontiĝis kun kosmostacio "Saljut-6", kie laboris du sovetaj kosmonaŭtoj, L. Popov kaj Rjumin.

ESPERANTO - LABORLINGVO DE DU MUZEOJ. Laŭ iniciato de Tereza Nemeri, Torun, kaj Stojĉo Cankov, Ruse, Esperanto estas la laborlingvo en la ligoj inter la etnografia muzeo de Toruń, Pollando,kaj la historia muzeo en Ruse, Bulgario.

INTERNACIA ESPERANTO-MUZEO en VIENO en la aŭstria televido. Ĵaŭde, la 14.8.80, en la dua programo oni povis dum 10 minutoj vidi kaj aŭdi pri Esperanto kaj IEMW.

5-a INTERNACIA JUNULARA FESTIVALO /"Esperanto kaj humuro"/ okazos de 16.-21.4.81 en Porretta Terma,proksime de Bologna.

SOVETUNIO. Ukraina junulgazeto "Molodj Ukraini"dufoje monate publikigas E-kurson gvidatan de Boris Kolker. Pli ol 1 700

personoj sendis al la redakcio kontroltaskojn. - En la Pionira Palaco de Kutaisi /Kartvelio/ ekzistas tre vigla Esp.-rondeto.

FERVOJISTOJ. Proksimume 300 gesamideanoj el 16 landoj partoprenis la 32-an IFEF-Kongreson en America /Nederlando de 16. - 22.de majo 1980. Alparolis la kongreson inĝ.D.S. Tuijnman, nederlanda ministro pri trafiko kaj akvostato. La 33-a IFEF-Kongreso okazos venontjare en Regensburg, F.R.G.de la 15.-21. de majo.

USONO. Lingvistika simpozio pri "Influo de gepatra lingvo je Esperanto" okazis la 10.5.80 en la Universitato de Illinois en Urbana-Champaign.-Jam por la 11-a fojo okazis en la Ŝtata Universitato de San Francisko trigradaj E-kursoj.

BRITLANDO. Parliamentary Esperanto Group nombras 108 membrojn. - La kompleta radio-kased-kurso "Jen Nia Mondo", kiun Grupo Kvin prilaboris dum pluraj jaroj, estas nun eldonita. Por lanĉi la kurson, Dr-o J.C. Wells, la kursgvidanto,demonstris ĝin en la brita parlamentejo ĉe kunveno de la Parlamenta Esperanto-Grupo la 6-an de marto; kaj la Grupo Kvin donacis ekzempleron al la parlamenta biblioteko "Library of Commons". - Sekve de la rezolucio pri Esperanto de Monda Federacio de Asocioj pri UN, Brita Esperanto-Asocio sisteme distribuas informilon pri Esperanto al la filioj de Asocio pri UN en Britio . Temas pri informilo specife direktita al tiu legantaro.

BULGARIO. 22 scienclaboristoj kaj oficistoj ĉe Ĉefa Administrejo "Hidrologio kaj Meteorologio", Bul.Lenin 66, BG-1113 S o f i a, en februaro finis elementan E-kurson kaj fondis fakan E-rondon. Ili serĉas kontakton kun gekolegoj,kiuj scipovas Esperanton. - En Bulgario aktivas esperantista ĥoro, kiu arigas 80 personojn.

HISPANIO. Ekde la 18.5.80 sur placo en grava kvartalo de Sabadell nomtabulo kun la nomo de la multjara tre aktiva esperantisto "Jaume Viladoms Valls", iama UEA-delegito kaj SAT-ano, pioniro de Esperanto kaj senlaca kursgvidanto.

ITALIO. La parlamenta grupo "Amikoj de Esperanto" arigas 76 membrojn.

TRADUKISTOJ. Por fondi internacian asocion de esperantistaj tradukistoj, Zbigniew Czupkałło, PL 24-220 Niedrzwica Duza, Pollando, petas rimarkojn, opiniojn, projekton de la statuto kaj aliajn materialojn.

GRUPO KOMPUTISTA. En Budapest 32 komputistoj kaj komputilistoj fondis fakan Esperanto-rondon, kiu aktivas sur la kampoj: perkomputila laboro, scienca literaturo, tradukservo k.t.p. Aperis unuaj numeroj de la informilo "Predis" /adreso: Grupo Komputista, pf.193, H-1368 Budapest, Hungario/.

ESPERANTO-POŜTMARKOJ. Ĝis 1980 aperis en la tuta mondo -42- diversaj Esperanto-poŝtmarkoj.

NOVA ELDONEJO. La Esperanto-Centro Paderborn, F.R.G.,fariĝis



laŭlega eldonejo, kies unua aperonta titolo estos nova versio de la konata lernolibro "Esperanto-programita".

INTERNACIA LITERATURA KONKURSO. La 1-an de junio en Milano, Italio, okazis premiado de la konkurso "Eŭropo". En la esperantlingva branĉo "Memorialo Kalocsay" la premiojn ricevis: 1.Adalbert Hules /Hungario/, 2.Johan H.Rosbach /Norvegio/,3. Nicolino Rossi /Italio/. Estas substrekinde, ke en la angla- kaj germanlingva sekcioj la unuajn premiojn ankaŭ gajnis esperantistoj, Carmel Mallia kaj J.H.Rosbach.

PREMIO SCHWARTZ. Kelkaj ĉeĥaj ĵurnaloj kaj la kultura semajngazeto Tvorba eldonata de CK KP informis laŭ la presagentejo ČTK pri la atribuo de la premio de Raymond Schwartz al la geedzoj Éva Tófalvi kaj Oldřich Knichal, aŭtoroj de la romano "Kiuj semas plorante" okaze de la 65-a UK en Stokholmo. Oni skribis i.a., ke "la premion proklamis Universala Esperanto-Asocio, neregistara organizaĵo de Unesko, por la plej bona prozverko en la Internacia Lingvo Esperanto".

Pri la eldono de la verko hungarlingve estas interesiĝo en Hungario.

## el leterkesto

### IMPRESOJ KAJ KONSIDEROJ

/Kazimjeĵ Ŝĉurek-PL/

La nombro de diversaj esp.kongresoj, renkontiĝoj, libertempadoj k.s. - registrataj en ĉiujaraj kalendaroj - estas grandega, sed same grandegaj estas diferencoj inter ili koncerne la nivelon kaj la organizan flankon. Fojfoje sub modesta anonco kaŝiĝas valora aranĝaĵo, alifoje multpromesa reklamaĵo estas preskaŭ ĉio kion la organizantoj kapablas doni.

La IV-a Esperanta Kultura Festivalo, okazinta inter la 12 kaj 14 de septembro en la ĉeĥoslovakia urbo Opava, apartenas - feliĉe - al valoraj aranĝaĵoj. Eĉ multe pli valoraj ol tion povus sugesti la negranda nombro de partoprenantoj.

Ni vojaĝis tien kun modestaj esperoj, sed revenis plene kontentaj, kun stimulita agademo kaj kun kredo ke esperantistoj tamen kapablas aranĝi ion valoran.

La programo daŭris ekde la vendreda posttagmezo ĝis la dimanĉa tagmezo, ampleksis distran vesperon, kantkonkurson, ekspoziciojn, librovendadon, ekskurson kaj - ĉefe - tre valorajn artajn programojn, en kiuj prezentiĝis infana kantgrupo, kanzonistinoj, operetaj gekantistoj, operaj gekantistoj, kantensembloj por malnova muziko, deklamantino kaj -ĉepinte- teatra aktorino. Mi konscie evitas kritikan pritakson de la festivalo, ja por tio plej kompetentas ĉeĥaj esperantistoj, sed kiel gasto kaj atenta observinto mi volas emfazi la eksterordinaran varman etoson de la tri tagoj. Malgraŭ kelkaj stumbletoj - kiuj cetere nenie mankas - ĉio iris gla-

te, trankvile, afable. La amatoraj artistoj preskaŭ ne diferencis disde la profesiaj kaj la profesiaj donis prezentaĵojn neforgeseblajn. La programon oni ne plenŝtopis,ni povis tute libere kaj trankvile diskuti kaj babili ankaŭ inter la programeroj, kaj tio kaŭzis apartan kontenton ĉar troveblis tie esperantistoj vere eminentaj.

Dum la diskutoj oni eĉ venis al harmonia konkludo ke Opava havas eksterordinare bonajn kondiĉojn por fariĝi loko de konstantaj kulturaj festivaloj similaj al la ĝisnunaj. Bonega klubejo "Ostroj", urbo vasta, pura kaj interesa, ne tro granda loĝantaro, nu kaj precipe - spertaj organizantoj.

Nur unu faceto de la festivalo vekis miron kaj surprizon: la relative nemulta partoprenantaro. Se oni reklamus ĝin ekzemple "Kongreso" aŭ io simila, tiam supozeble venus pli da homoj, sed "kultura festivalo"?, tio sonas strange, eble ne estos tie sufiĉe da tempo kaj okazoj por saluutoooni!, ŝmace interkisi alvange, vagadi de unu salono al alia dum okazanta programo ktp. Tamen homoj de l' kulturo trovis tie veran frandaĵon. Dum alispecaj renkontiĝoj oni tro multe debatas, disputas, elektas, voĉdonas k.s. kaj la artaj programeroj havas nur marĝeman rolon, en Opava ili estis la kerno,la ĉefaĵo, kaj eblis vidi, kiel ni agadas kaj kion ni atingas en la sfero de l' kulturo. Ankaŭ - finfine - la verkistoj kaj artistoj, agantaj preskaŭ ĉiam senpage, almenaŭ havu eblecon vidi fruktojn de sia laboro.

Estas do multaj kaŭzoj por apogadi la opavan festivalon, kiu povus fariĝi unu el la plej valoraj aranĝaĵoj ne nur enlande, sed eĉ internacie.

Ĉeĥoslovaka Asocio de korpeduko, regiona komitato Pardubice, per letero al ĈEA la 8-an de septembro 1980 esprimas la dankon pro la subteno kaj partopreno en la IX-a Marŝo de Paco - Ležáky 1980. Fine de la letero estas esprimita la espero pri favora subteno de la jubilea X-a Marŝo de Paco - Ležáky 1981. La dankleteron subskribis ĉefaj funkciuloj Ing. Josef Kotyk CSc. kaj Jiří Chvála.

\- - -

Karaj geamikoj! Koncerne enhavon - estas la kvara numero de STARTO vere eminenta! Ĝi estas informriĉa - plena de interesaj artikoloj - alloge preparita. Mi estas tre agrable surprizita kaj al la Redakcio mi plenkore gratulas! Daŭrigu la agadon en la sama senco, mi deziras al vi pluajn sukcesojn.

Koramike via František Stejskal,
Osek u Duchcova 651

Dankon pro senditaj numeroj de STARTO.Vere ni devus trovi la manieron por disvastigi ĝin ankaŭ inter okcidentaj esperantistoj.

Tre amikajn salutojn
Renato Corsetti
Vicprezidanto de UEA





SALUTON POR NIAJ LEGANTOJ KAJ FOTON SENDIS KANTISTINO GALJA KOSTOVA EL BULGARIO (VIDU ANKAŬ ARTIKOLON PRI OPAVA)

# ni recenzas

TERMINARO de pelt-industriaj maŝinoj, ekipaĵoj kaj ilaro, oklingva, inkluzive Esperanton, estis eldonita de la ŝtata Ofico por Normigo kaj Mezuroj, Praha, 1980, 21x15, 51 p., kun tripaĝa Esperanta aboca registro, prezo Kčs 13,50, kiel ĉeĥoslovaka fakbranĉa normo /oborová norma č. 79 8001/. Sed la citita titolo estas indikita unuapaĝe, sole en la lingvoj ĉeĥa, rusa, Esperanta kaj angla. Aĉetebla en regionaj vendejoj de teĥnikaj normoj. Disdonita al ĉeestantoj de la Seminario pri apliko de E. en la scienco kaj teĥniko en Ústí n.L.

Aŭtoro de la E.-versio estas Lubomír Středa, estro de normiga fako en KARA, n.p. La terminaro, konsultita ĉe membroj de STS de ĈEA, evidente taŭge redonas la signifon de la originalo. Du specimenoj: připevňovací pistole visaček - fikspistolo de pendŝildetoj; mizdřicí stroj /fleshing machine, Entfleischmaschine/ - maŝino por forigado de subhaŭta konektivo. /Eble sufiĉus "forigo"/. - La eldono estas plua pruvo pri sukcesa aktiveco de la STS-anoj.

/JM/

**MIA KREDO.** Karl Marks kun Pritrakto de Frederik Engels. Eldonis Esperanto Editions, Hastings, 74 Saxon Road, Anglio, 1980. Paĝoj 15 de poŝtkarta formato. Broŝurita, pogranda prezo 35 ang.pencoj.

La tekston redaktis Frank Maitland, tradukis Edward Ockey.

La verketo volas doni en ekstreme konciza formo la esencon de marksismo laŭ vortoj de Marks kaj Engels. La aŭtoro Frank Maitland diras en la fina frazo de sia antaŭparolo: "Ni esperas, ke ni fidinde donis veran kaj precizan prezenton de la opinioj de Marks kaj Engels pri la materiisma doktrino de la historio, la kerno kaj radiko de tio, kion oni nun nomas la marksismo".

La unua parto "Karl Marks" citas el la "Enkonduko" al 'Kontribuo al la kritiko de la politika ekonomio' el januaro 1859. La dua parto "Frederik Engels" citas el leteroj al Josef Blok el la 21 sept. 1890, al Konrad Schmidt el la 27 okt. 1890, al Franz Mehring el la 14 jul. 1893 kaj al Heinz Starkenburg el la 25 jan. 1894. La verketo donas konforme al sia amplekso koncizan imagon pri la historia materialismo. La lingvaĵo estas senriproĉa kaj ne troveblas preseraroj.

Jiří Kořínek

"Vexilologie", N-ro 38, julio 1980, pĝ. 699-700 - bulteno de Veksilologia Klubo en kadro de OKD Praha 3 raportas:

## V E K S I L O L O G I A   L I T E R A T U R O

Jaroslav Klement: Heraldiko-Veksilologio - Terminaro en Esperanto, Ĉeĥa Esperanto-Asocio, LG Karlovy Vary, 1979.

La okcidentbohema aktiva membro de nia klubo nin pasintjare surprizis kaj ĝojigis per tre interesa publikaĵo, unue aperinta nur en 20 ekzempleroj eldonitaj pere de li mem, sed baldaŭ multobligita rotaprinte en 200 ekzempleroj eldonitaj fare de LG ĈEA /klubo "La Progreso"/ en České Budějovice kaj estas vendata por 30,- Kčs. Jaroslav Klement en tiu ĉi monografio resumis kaj kunigis kun vere profesia zorgo kaj diligento siajn hobiojn: veksilologion, heraldikon kaj Esperanton. Tiel estiĝis unika manlibro praktike preciziganta, kodifikanta kaj tiel enkondukanta veksilologion kaj heraldikan terminologion en Esperanto. Rilate al enkondukitaj recenzaj rimarkoj de ekster- kaj enlandaj specialistoj en ĉiuj tri fakoj eblas supozi, ke la manlibro aŭ pli precize ĝia novkreita vortfonto en Esperanto estos ĝenerale akceptita, uzata kaj signife helpos disvastigi la scion pri veksilologio inter la esperantistoj en la tutmondo.

La manlibro elstaras per bona grafika aranĝo kaj estas riĉe ilustrita per skemaj desegnaĵoj. Ĝi enhavas 40 paĝojn de la enkonduka teksto pri heraldiko en Esperanto kaj 40-tabelojn de la komparaj heraldikaj terminoj en Esperanto, angla kaj ĉeĥa lingvoj, sed kelkaj tekstoj estas sole en Esperanto. La veksilologia teksto enhavas 30 paĝojn en Esperanto kaj 25 funkciajn tabelojn priskribantajn unuopajn tipojn kaj specojn de standardoj kaj flagoj el kelkaj mondlandoj. Pluaj 8 komparaj tabeloj enhavas veksilologiajn ter-



minojn en Esperanto, germana, angla, franca, rusa kaj ĉeĥa lingvoj. Publikiĝo de la uzita literaturo, zorgemo kaj detaleco en aparato de la fontoj ebligas bonan orientiĝon en la problemaro kaj oni povas nur bedaŭri, ke tiel respondece preparita monografio ankoraŭ ne aperis normalprese. Estas vero, ke la rotaprinta formo estas destinita sole por esperantistoj - veksilologiistoj kaj heraldikistoj, sed post la traduko de ĉiuj akompanaj tekstoj en iun el la klasikaj lingvoj ĝi certe vekus grandan ĝeneralan intereson.

PhDr Zbyšek S v o b o d a

## En la ĉeĥan el Esperanto

La ŝtata eldonejo "Albatros" en Prago ĉi jare eldonis en la populara libroserio ESA la antologion de scienc - fikciaj rakontoj de diversaj aŭtoroj sub la titolo "La kreintoj de novaj mondoj" /Stvořitelé nových světů/. Inter la prezentitaj aŭtoroj estas i.a. ankaŭ japana verkisto Gaku Konisi, kiu skribas siajn literaturaĵojn en Esperanto. Tiu ĉi fakto estas en la libro ankaŭ menciita /pĝ. 285/. La antologion kompilis samideano Ivo Železný, kiu la plej parton ankaŭ tradukis kaj kompletigis per klarigaj notoj. Jen sekvinda ago de la ĉeĥa literaturisto!

V.K.

## HISTORIO DE UNU LETERO

Antaŭ dekdu jaroj trovis s-ano Ladislav Cibur en Zbislavo koncept. de neforsendita letero, skribitan de František Vladimír Lorenc /1872 - 1966/ en 1890. Tiu ĉi valora atesto pri praktika uzado de Esperanto jam en tre frua tempo estas leterforma artikolo pri slavlingva fonetiko, destinita al ĝis nun nekonata eksterlanda lingvisto. Pro malsano de aŭtoro kaj pro lia vigla aktivado inter ĉeĥaj laboristoj ne restis tempo finpretigi kaj forsendi la leteron. Fotokopion de tiu dokumento ricevis antaŭ nelonge s-ano Canko Murgin el Bulgario. Surbaze de historiaj esploroj li sukcesis trovi la nekonatan ricevonton. Jen kelkaj konkludoj de s-ano Murgin:

El.la letero elfluas, ke ĝia adresato korespondis kun Lorenc ĉefe pri fonetiko. Li scipovis irlandan, anglan kaj ĉinan lingvojn. Kun Lorenc li probable interkonsentis pri reciproka interŝanĝo de lingvistikaj informoj kaj lernado de fremdaj lingvoj helpe de Esperanto. Serĉante saminteresulojn, ili ambaŭ sendis al Zamenhof reklamanoncetojn, kiuj aperis en "La Esperantisto" en decembro 1890. Laŭ la anonco Lorenc pretas instrui slavajn lingvojn. Simile promesas instruon de angla, hinda kaj ĉina lingvoj Richard H.Geoghegan. Li estas do nekonita korespondinto de Lorenc.

R.H.Geoghegan /1866 - 1943/ estis irlandano edukita en Anglio. En Oxford-Universitato li studis ĉinan, hindan, latinan

kaj kelkajn aliajn lingvojn. Unue li aliĝis al Volapuko. En 1887 li eksciis pri Esperanto kaj tralegis poemon "Ho, mia kor' ". Latinlingve li kontaktis Zamenhof kaj ricevis de li lernolibron. Komence de 1890 aperas lia nomo en la unua adresaro de la esperantistoj. Fine de la sama jaro li transloĝiĝis el Anglujo al Usono, kie li laboris kiel ŝtatoficisto. Dum sia tuta vivo li lernis lingvojn. Inter ĉirkaŭ 20 lingvoj, kiujn li scipovis, estis indiĝenaj lingvoj de Nordameriko. Li verkis ekz. gramatikon de aleuta lingvo kaj tradukis poemon "Ho, mia kor'" en indianan lingvon ĉinuk.

En septembro 1890 estis do tiu lingvisto korespondanto de Lorenc. La transloĝiĝo de la unua kaj malsaniĝo de la dua malebligis pluan korespondadon inter ili. Nur la neforsendita letero prezentas al ni interesaĵon el la aktivado de la unuaj esperantistoj.

PhDr Barandovská

# RONDETA VIVO

BRNO - La 16.9. 1980 aranĝis EK koncerton de pola studenta kanthoro pri antikva muziko el Bydgoszcz. La unua parto de la programo estis prezentita en E, popolkantoj kaj komponaĵoj, en la dua parto estis prezentitaj gravaj kaj superbaj komponaĵoj el tempo de la renesanco kaj baroko. La koncertvespero estis tre solena kaj amika, ĝia nivelo atingis suprojn de la arto, sukceso grandega. Partoprenis ĉ.100 homoj.

FRÝDEK-MÍSTEK - La 21.9.okazis en kafejo Esperanto prelego de verkisto Bohumil Marek: Granda Moravio.

MĚLNÍK - novaj kunventempoj por ebligi al eksterurbaj membroj la partoprenon: sabate la 15. de novembro ekde h.9,30 en ZDŠ Jungm.sady prelego kun lumbildoj Hiroŝima-Nagasaki /Křimský Zd./. Sabate la 13-an de dec. samhore kaj samloke minidramo de V.Vinař:Ĉerande de l'abismo - aktoras Eva Seemannová.Krome aktualaĵoj,gramatiko ktp.

KARLOVY VARY - La 28.9.1980 en Boží Dar estis subskribita amikeca kontrakto de LG ČEA Karlovy Vary kaj SDLR Esperanto en Schwarzenberg /Ercmontaro - GDR/.La plej grava decido estas alternigi la renkontiĝojn de Ercmontaraj esperantistoj foje en Merklín /'81/ kaj foje en Schwarzenberg-GDR /'82/. La ĝemeliĝintaj kluboj interŝanĝos spertojn el la disvastigado de E-o en siaj landoj;komunajn kaj privatajn vizitojn kaj speciale zorgos pri edukado de la junularo. J.Kl.

PRAHA - En plua kunsido de la Literatura sekcio de ČEA 2.10. en la kafejo Na Valdeku J.Karen raportis tre interese pri la UK en Stokholmo kaj ĝia literatura konkurso / 4 premioj por ČSSR/. E.Urbanová raportis pri la rilato de la ĉeĥa gazetaro al E.,specimenojn de Esp. poezio de Karen kaj Rumler deklamis E.Seemannová. La ĉeĥaj poetoj Lazecký, Axmanová k.a. prezentis po unu peco el sia nova ĉeĥa verkado. La 20. 10. en Strojimport d-ro Fr. Kožík rakontis pri la Verda stacio. jm



PŘEROV - la estraro de EK decidiĝis aranĝi nunjare nur kursojn por progresintoj kaj konversaciajn por efike disvolvi agemon de la konstantaj membroj kaj altigi ilian lingvonivelon. Jam post kelkaj kunvenoj montriĝis,ke la decidiĝo kreskigis intereson kaj agemon de ĉiuj klubanoj.
La grupo vizitis laŭ invito de EK en Kaposvár ĉi tiun belan sudokcidentan hungaran urbon okaze de la Naturamika renkontiĝo "Aŭtuna Migrado". La partoprenintoj konatiĝis kun bela urbo,ekskursis piede kaj buse tra la belega regiono, vizitis plurajn urbojn,admiris folklorajn kolektojn,muzeojn,ĉeestis amuzajn programojn kaj prelegojn.Apud la lageto en "Valo de karpentoj" ĉiuj estis kontentaj.Forta deziro:venontjare tien reveni.

TÁBOR - En "Táborský zpravodaj" daŭre aperas artikoloj pri Esperanto /F.Knotek/, ampleksaj kaj valoraj informoj.La meritplena laboro de la nomita aŭtoro estas sekvinda aliloke!

## KORESPONDI ✻ DEZIRAS ✻ ANONCOJ

Por ĉiuj 25 vortoj vi pagos 15 Kčs aŭ 5 irpk.Abonantoj el eksterlando turniĝu al viaj perantoj pri detalaj informoj!

Esperantajn librojn - escepte lernolibroj, deziras aĉeti Josef Vašek,str.S.Teichmanna 68, O l o m o u c /777 00/.Li serĉas ankaŭ geamikojn por aŭtoturistiko eksterlanden. Skribu al ČEA.

19-jara esperantisto el Namibio volas korespondi kaj ŝanĝi poŝtmarkojn:Ottmar von HOLTZ poŝtfako 11086 KLEIN-WINDHOEK, 9000 Namibio.

Ilona FEDOR/24-jaraĝa/ deziras korespondi.Skribu al 3535 MISKOLC,Szepvolgy u.19,Hungario .

Iliana Nikolova KIRILOVA, str. Gatadfa 5, ST.DIMITROV,BG 2600 17 jara studentino priastronomio,muziko kaj PM/ankaŭ ruse , france/.

# KRONIKO

Jaroslav Vácha, gvidanto de EG en Příbram festas la 22-an de okt.1980 sian 60-jaran vivjubileon.Kun ĉiuj rondetanoj ni sincere gratulas kaj deziras fortan sanon.

\- - -

La 22-an de aŭgusto 1980 adiaŭis esperantistaro de Přerov sian honoran membrinon,kunfondintinon de la movado en Přerov s-aninon Emilie Chmelařová,mortinta en aĝo de 90jaroj. Esperanton ŝi ekposedis jam en 1902 en Bystřice pod Hostýnem. Ĉe lulilo de la movado en Přerov ŝi staris kaj daŭre apartenis al ĉefaj laborantoj.Respektplene ni rememoros ŝin.

\- - -

La 2-an de okt.la esperantistoj en Praha adiaŭis al Antonín S l a n i n a, mortinta en la aĝo 75 jaroj. La mortinto


plenumis plurajn funkciojn en la movado: fondo de Regiona Esperantista Ligo en Č. Těšín kaj de ARE en H. Litvínov, vic-prezidanto de EK en Praha, komitatano de EAČSR, D kaj VD de UEA, laboranto en la "Verda stacio", kunfondinto, instruisto kaj amuz-estro de Somera Kolegio de E. en Doksy, oratora kursgvidanto, redaktanto de "Verda voĉo de Doksy"/dum la kolegio ĉiutage aperinta/longjara kursgvidanto en Praha. UEA decidis nunjare eldoni lian nov-metodan lernolibron de Esperanto. jm

## Krucenigmo

Horizontale: A. Persekuti beston por kapti ĝin /R/; moka kritiko /R/; parto de parlamento en iuj landoj /R/; "kverko" angle. - B. La unua parto de eskima proverbo. - C. Ĉevalbleki; el metalfadeno farita; greka ĉefurbo; evolustadio de insekto; tranĉaĵo de viando por friti /R/. - Ĉ. Kemia grupiĝo, en kiu alkohola funkcio najbaras duoblan ligon; rilatanta kavernon; multekosta metalo; havanta econ de kanto; romia diino de agrikulturo /R/. - D. Mallongigo de Niĝera Televizia Societo; finaĵo de futura gerundio; tuj uzebla /R/; havanta econ de patro-de-patro; teksaĵo el ŝnuroj kun grandaj interspacoj; kunulo de virino /R/; mallongigo de Trinidada Pres-agentejo. - E. Malmolega; romie 503; ne atingis ire la lokon; komenci batalon /R/; brue elspiri aeron per la nazo /R/.- F. Urbeto en Niĝerio; urbeto en Estonio; laboristo de urba trafiklinio /sen fina o/; havanta formon de parto de cirklo; tia estas la vojo, kiun oni iros /sen fina a/. - G. La dua parto de la proverbo. - Ĝ. Romie 57; Roterdama filologo kaj verkisto /1467-1536/; japana religia sekto uzanta E-on; urbeto en Kalifornio.

Vertikale: 1. Virnomo /R - angla reĝo sesfoje edziĝinta/. - 2. Aparato helpanta ŝanĝi la aeron en la ĉambro /sen fina o/. 3. Aziano; antikva senrajta homo /R/. - 4. Arbedo el kies folioj estas produktata indigo; japana insulo. - 5. Konjunkcio montranta malsamecon; fari ondojn. - 6. Unuo de laboro en la CGS-sistemo /R/; tiel efikas tuŝo per fingro sur plandon. - 7. Longa, ne tro larĝa peco de teksaĵo /R/; kompleto de instrumentoj /sen fina o/. - 8. Profesie roli en teatraĵoj; rusa rivero. - 9. Nomo de la 24a E-a litero; tenis sian vidon al io. - 10. Femala; kronika lezo de arterioj, karakteriza per formiĝo de fokusoj, entenantaj pusosimilan kaĉon /R/. - 11. Taĉmento da soldatoj; ano de nacieto de kaŭkaza dagestana grupo. - 12. Inklino al obeemo. - 13. Bona korpa stato; psiko. - 14. Inklino; vira kolumo en la 16a - 17a jarcentoj. - 15. Persona pronomo; alta opinio pri ies valoro /R kun artikolo/. - 16. El ligno de sudeŭropa arbo farita; sumo da jaroj ekde naskiĝo. - 17. Festa kuko; ĉevala paŝo /R/. - 18. Mallongigo de Usona flugkompanio; krudaĵo por fari kandelojn. - 19. Simbolo de aroko; palmosimila arbo el kiu oni ricevas saguon. - 20. Akva kortbirdo /R/; montra propono plurala. - 21. Unumasta ŝipo /R/; rilatanta la centron de






pensado. - 22. Denove elmeti ion al eksperimento. - 23. Kompozitaca herbo /R/.

Helpo: R = radiko de la vorto. - Ĉ. Ceres/a/. - D. CPA. - F. Illo; Ikla. - Ĝ. Ojai. - 4. Aomi. - 8. Aca. - 10. Aterom /o/. - 18. NVA. - 19. Cikaso. - 23. Ksanti/o/.

Adolf Staňura

Sufiĉas sendi ĝustan tekston de la eskima proverbo ... la solvintoj ricevos libropremiojn. Limdato 1.12.1980.

KRUCENIGMO DE LA 4-a STARTO HAVAS SOLVON: ĈIU TRE KLOPODU EN SIA METIO- TIAM.EN LA URBO MANKOS NENIO!

Balan libron ricevas :M.Strumínská,V.Hlavatý,K.Štěpánek.Gratulon

## INFORMOJ EL SEKRETARIEJO

RAKONTOJ EL LA UNUA POŜO kaj RAKONTOJ EL LA DUA POŜO

Ĉeĥa Esperanto-Asocio jam pli longan tempon sisteme preparas eldonadon de ĉeĥaj aŭtoroj en esper. traduko.

Ankaŭ por la venonta jaro estas planita libro de elstara ĉeĥa aŭtoro Karel Č a p e k, inter la legantoj konata pro famaj verkoj Milito kun salamandroj, Krakatit, RUR, Blanka malsano k.a.

Rakontoj el la unua poŝo kaj Rakontoj el la dua poŝo, kiel titolas la nova eldono, estos unu el juveloj de ĉeĥa literaturo. Estas vere meritplena ago, ke la Rakontoj en kolekto baldaŭ venos el la manojn de esperantistaj legantoj, kvankam nenia traduko kapablas esprimi senmanke plenan belecon, riĉecon kaj spiriton kun ĉiuj vortturnoj de popola esprimado kaj ĵargono de Čapek.

La traduko de Josef Vondroušek estas altvalora kaj atestas lian profundan komprenon de la verko dokumentante ankaŭ liajn riĉajn tradukajn spertojn.

Eldonkvanto 5000 ekz., formato A5, proksimume 300 tekstaj

paĝoj kun riĉaj ilustraĵoj. Ĉiuj literaturamantoj jam nun ĝojatendu kaj antaŭmendu la libron en ĈEA.

Laŭ nia scio ĝemelaj rilatoj kun E-grupoj en GDR ekzistas kaj bone prosperas inter:

1. E-rondeto en Česká Třebová kaj E-rondeto en Schwerin,
2. E-klubo en Teplice kaj E-grupo en Freiberg,
3. E-Interklubo en Pardubice kaj E-klubo en Meissen,
4. E-klubo ĉe Kulturdomo Pardubice kaj E-grupo en Berlin - Lichtenberg.

Ĉu aliaj konstantaj similaj amikaj kontaktoj ne ekzistas?

Informu nin! Estas ja intereso de ni ĉiuj pliprofundigi la kunlaboron kun E - organizo, kun kiu ni subskribis kontrakton pri kunlaboro.

## STATISTIKO POR IOMA MEDITADO

Fine de ĉi jara septembro nia Asocio havis entute: 2606 membrojn

| | | |
|---|---|---|
| El ili en la kategorio | A | 1305 " |
| " | B | 610 " |
| " | C, D, E | 536 " |
| dumvivaj membroj | | 155 " |

La plej nombraj lokaj grupoj estas:

| | |
|---|---|
| Praha | 202 membroj |
| Brno | 141 " |
| Třebíč | 105 " |
| Mělník | 103 " |
| Ostrava-VŽKG | 101 " |
| České Budějovice | 81 " |
| Pardubice-Dukla | 81 " |

De la jarkomenco pro diversaj kaŭzoj:

| | |
|---|---|
| 1/ ĉesis la membrecon | 171 personoj |
| 2/ membriĝis | 326 " |

Membroŝanĝoj de la jarkomenco:

| Loko: | malkresko − % | alkresko + % | abs.ŝanĝo ± % |
|---|---|---|---|
| Bor u Tachova | 23 | 0 | -23 |
| Brno /B.Václavka/ | 1,4 | 7 | 6,4 |
| Brno I.strojírna | 0 | 0 | 0 |
| Česká Třebová | 0 | 15,3 | 15,3 |
| České Budějovice | 0 | 8,6 | 8,6 |
| Děčín | 0 | 8,3 | 8,3 |
| Domažlice | 0 | 53,3 | 53,3 |
| Frýdek-Místek | 3,7 | 18,5 | 14,8 |
| Gottwaldov | 3,6 | 14,3 | 10,7 |
| Havířov | 4,1 | 0 | - 4,1 |
| Havlíčkův Brod | 0 | 2 | 2,- |
| Hodonín | 13,6 | 31,8 | 18,2 |
| Hořice v Podkrkonoší | 0 | 0 | 0 |
| Hrabyně - léčebna | 0 | 90,9 | 90,9 |
| Hradec Králové | 8,1 | 0 | - 8,1 |
| Hranice | 4,5 | 18,1 | 13,7 |
| Cheb | 0 | 8 | 16,7 |
| Jablonec nad Nisou | 2,4 | 0 | - 2,4 |
| Jaroměř | 37,5 | 0 | -37,5 |
| Karlovy Vary | 21,7 | 21,7 | 0 |
| Kladno | 4,1 | 37,5 | 33,4 |
| Kolín | 9,5 | 14,2 | 4,8 |
| Kopřivnice | 0 | 0 | 0 |
| Kyjov | 12,5 | 0 | -12,5 |
| Lanškroun | 0 | 0 | 0 |
| Liberec | 15,7 | 5,3 | -10,4 |
| Litomyšl | 12,5 | 0 | -12,5 |
| Mělník | 4,8 | 2,9 | - 1,9 |
| Městec Králové | 0 | 12,5 | 12,5 |
| Miletín | 0 | 0 | 0 |
| Mnichovo Hradiště | 16,6 | 0 | -16,6 |
| Most | 0 | 16 | 16,- |
| Olomouc | 8,1 | 6,1 | - 2,- |
| Opava | 3,1 | 3,1 | 0 |
| Ostrava - Vítkovice | 6,9 | 13,9 | 7,- |
| Ostrava - Poruba | 22,2 | 11,1 | -11,1 |
| Ostrov nad Ohří | 0 | 0 | 0 |
| Pardubice Dukla | 2,5 | 33,3 | 30,8 |
| Pardubice Interklub | 0 | 31,8 | 31,8 |
| Paskov | 100 | 0 | -100,- |
| Písek | 0 | 0 | 0 |
| Plzeň | 3,2 | 9,8 | 6,6 |
| Poděbrady | 17,6 | 5,8 | -11,8 |
| Polička | 30 | 0 | -30,- |
| Praha | 8,4 | 5,- | - 2,5 |
| Prostějov | 2,3 | 9,1 | 6,8 |
| Přerov | 0 | 20,- | 20,- |
| Příbor | 5,6 | 0 | - 5,6 |
| Příbram | 13,- | 4,3 | 8,7 |
| Roudnice nad Labem | 0 | 0 | 0 |
| Semily | 0 | 0 | 0 |
| Stonava | 0 | 18,5 | 18,5 |
| Svitavy | 22,7 | 9,- | -13,7 |
| Šumperk | 5,5 | 19,7 | 13,9 |
| Tábor | 6,6 | 0 | - 6,6 |
| Teplice | 3,7 | 3,7 | 0 |
| Trutnov | 9,5 | 0 | - 9,5 |
| Třebíč | 9,5 | 3,8 | - 5,7 |
| Třinec | 0 | 10,2 | 10,2 |
| Ústí nad Labem | 0 | 27,2 | 27,2 |
| Vrbno pod Pradědem | 0 | 10 | 10,- |
| Vsetín | 9,3 | 2,3 | 7,- |

| | | | |
|---|---|---|---|
| Vyškov | 0 | 10 | 10,- |
| Znojmo | 4,3 | 30,4 | 26,- |
| rektaj membroj de la Asocio | 10,1 | 27,3 | 17,2 |
| E n t u t e | 6,6 | 12,4 | 5,8 |

La statistiko dokumentas, ke la membra bazo kontraŭ la pasinta jaro altiĝis je 5,8 %. Ĉ u t e m a s p r i s t a t o f a v o r a aŭ a l a r m i g a ? Kvankam iam procenta stato povas signifi absolutan ŝanĝon nur je kelkaj personoj, eblas konstati: kie ekzistas volo bone prepari kunvenajn programojn kaj entute zorgi pri la membraro, tie montriĝas pozitivaj rezultoj.

La situacio en certaj lokaj grupoj igas pripenson de novaj regionaj komitatoj, kiuj formiĝas, bone trastudi tiun situacion, persone ekkoni kaj analizi kondiĉojn de la laboro de niaj grupoj. Detala analizo de ĉiuj komponentoj estu bazo de nova plano de aktiveco, por ke la antaŭkongresa jaro 1 9 8 1 estiĝu jaro de ankoraŭ pli bona laboro kaj sukcesa disvolvo de nia movado.

A n k a ŭ v i a j n s u g e s t o j n kaj u n u a v i c e h e l p o n a t e n d a s t u t a m o v a d o en n i a l a n d o !

## XII. ročník soutěže "DĚTI, MÍR A UMĚNÍ" v P l z n i

Městská mírová rada v Plzni organizuje XII. ročník soutěže "Děti, mír a umění" ve školním roce 1980/81 motivovaný hlavně 60. výročím založení KSČ a XVI. sjezdem KSČ pod heslem:

"Proč je mi dobře na světě" .

Motivace pro soutěžní práce:

- 60 let Komunistické strany Československa - 60 let boje za socialismus a mír.
- Budovatelské úsilí našeho lidu při plnění usnesení XV.sjezdu KSČ.
- Naše vlast roste společnou prací do krásy.
- Budováním socialismu upevňujeme mír a posilujeme tábor pokrokových a mírových sil.
- Československá mládež přispívá k plnění volebních programů Národní fronty.
- Pryč se zbraněni hromadného ničení.
- Výzkum kosmu musí sloužit jen mírovým účelům.
- Tvorbou a ochranou životního prostředí přispíváme k uchování bohatství přírody i krásy naší země.
- Československá lidová armáda spolu s armádami Varšavské smlouvy chrání mír.
- Leninská mírová politika Sovětského svazu - záruka budoucnosti lidstva.

Termín soutěže do 30.ledna 1981. Zúčastnit se mohou pionýři a všechny ostatní děti a mládež z ČSSR.



Soutěž má 2 části :

1. literární - formu zpracování si volí každý účastník sám
2. výtvarnou - techniku dvojrozměrných /i trojrozměrných/práci si volí každý sám v rozměrech formátu A4 až A1.

Kategorie.

Děti ve věku 6 až 12 let soutěží ve výtvarné části.

Děti a mládež 13 až 19 let soutěží ve výtvarné i literární části. U všech prací nechť je uveden věk soutěžícího.

Odměny.

1. Vyhlašovatel soutěže odmění vyhodnocené práce ve všech kolech diplomem.
2. Vítězové jednotlivých kol získávají vedle diplomů i věcné ceny a někteří z vítězů z národního kola i týdenní pobyt v pionýrském táboře.
3. Autoři prací, kteří postoupí do národního kola, obdrží diplom za účast.

## NOVA LITERATURA KONKURSO - TEMO "P A C O"

Kujavi-Pomerania Societo pri Kulturo anoncas novan konkurson pri poezio aŭ prozo originala aŭ tradukita en Esperanton pri la temo "Paco". La konkursaĵojn oni sendu ĝis 31.03.1981 al: Kujawsko-Pomorskie Towarzystwo Kulturalne, Al.1 Maja 20, PL - 85-006 B y d g o s z c z, Pollando. Aŭtoroj de la premiitaj konkursaĵoj partoprenos senpage la VI-an Internacian Esperanto-Renkonton "Bydgoszcz - 81", ricevos diplomojn kaj objektajn premiojn. La plej bonajn konkursaĵojn oni publikiĝos ankaŭ en speciala kajero.

La partoprenantoj de la nova konkurso "Paco"estas petataj:

1/ tajpi siajn konkursaĵojn kun interspaco kaj alsendi ĝin en du ekzempleroj;

2/ la poeziaĵoj estu ne pli longaj ol dupaĝaj, la proze skribitaj konkursaĵoj - maksimume tri-paĝaj, kun maldekstra flanka marĝeno;

3/ rajtigi la konkursan komisionon korekti aŭ mallongigi la premiitajn konkursaĵojn, destinitajn por publikigo.

## PRINTEMPA RENKONTIĜO DE LA JUNULARO

Junulara komisiono de ĈEA kunlabore kun Esperantista Klubo /KŠV BV/ en Brno preparas por la tagoj 10-a - 12-a de aprilo 1981 la renkontiĝon de ĉeĥa kaj slovaka junularo en VYŠKOV /suda Moravio/. La renkontiĝo havos turisman - kulturan programon. Invititaj estos ankaŭ eksterlandaj junularaj reprezentantoj. Antaŭvidata prezo proksimume 250 Kčs.La aliĝilojn deziru de D-ro Vladimír Š k o d a, Leninova 464 ŠLAPANICE u Brna /664 51/.

Anoncu vin senprokraste, la efektivigo dependas de sufiĉa nombro de gravaj interesuloj.

## S A E S T '81 - Ž I L I N A

Scienc-teĥnika sekcio de Asocio de Esperantistoj en Slovaka socialisma respubliko invitas vin al 3-a seminario pri apliko de Esperanto en scienco kaj teĥniko okazonta fine de a ŭ g u s t o 1981 en Žilina.

La seminariaj temoj:
- problemoj de faka aplikado, terminologiaj demandoj k.s.
- fakaj prelegoj.

La seminario estos tri-taga, sekvata de Turismaj Tagoj de Žilina. Kaptu la okazon samtempe ferii en la pitoreska montara ĉirkaŭaĵo de Žilina. Dum la seminario okazos ankaŭ speciala programo por neesperantistoj.

Prelegontoj kontaktiĝu kun Ing. Aleš Bednařík, Lotyšská 8. 834 00 BRATISLAVA

Kun tiu ĉi numero de Starto vi ricevas PK sur kiu estas propono pri abono de kelkaj E-gazetoj, kiujn distribuos nia asocio. Ni atentigas pri abono de la revuo "Bulgara Esperantisto" - organo de Bulgara Esperantista Asocio, unu el la plej malnovaj Esperanto-periodaĵoj en la mondo. Ĝi havigos al vi interesan legaĵon en Esperanto : artikolojn /beletro kaj poezio /, distraĵojn /humoro, vortenigmoj k.a./ En ĉiu numero - adresoj de korespondemuloj. Aparte gravaj : pere de la revuo vi havigos abundajn informojn pri la vivo kaj agado de la esperantistoj en Bulgario, la lando, kie la Esperanto-movado tiel bonsukcese marŝas antaŭen. Kaj tio, kredeble, pliriĉigos viajn spertojn. La revuo aperas ĉiumonate en formato 20 x 30 cm, ĉiu numero en 20 paĝoj.

**LA TUTA MONDO PLIALTIĜAS PREZOJN - NUR NIA ASOCIO PLIMALALTIĜAS NOVA, PLI VASTA OFERTO DE LA VARO - OFTE PREZOJ RABATITAJ PRI LA 50 DA PROCENTOJ**

INSIGNOJ : po Kčs
insigno -stelo Ø 5 mm ...... 5,--
MEM .......................... 4,--
ČSSR-esperantistoj ........... 8,--
SET Lančov ................... 8,--
insigno de pacmarŝadoj ...... 2,50
Veterana klubo ............... 5,--
Fervoji sta .................. 5,--
stelo kun litero E ........... 8,--
stelo kun vorto Esperanto ... 8,--
stelo sur ronda kampo ku E... 8,--
Klubo de kolektantoj de E-insignoj en du specoj ......... 5,--
segmenta kun stelo kaj vorto
Esperanto .................. 5,--
medicinista ................ 5,--
Internacia Fiŝkaptista Esperanto klubo ..../10 specoj/.. 5,--

DIVERSAĴOJ po Kčs
glumarkoj kun globo... 1,60
" sur kofroj, tekoj... 2,60
" sur folio kun Eo... 2,--
" " " pligrandaj... 5,--
" " " MEM ......... 2,--



propisot/50 simb./.. 27,--
textilaj simboloj gladebaj /2 specoj -3 koloroj..5,--
kalendero konstanta .. 7,--
silona sako ku E-o ...15,--
afiŝoj por E-kursoj ... 0,70
BK-oj /5 pecoj kaj prospekto pri SET .... 6,70
BK pri SET-Lančov /kolora -1 peco /..... 1,40
gramodisko stereo kun V.Damjanov -BLR.. 44,00

LIBROJ :
Lernolibro de Kilián 18,50
poŝvortaro de Hromada 14,50
slovaka vortaro ..... 40,00
La mondo rakontas ... 8,00
Kontinento sen interpretistoj/en ĉeĥa/... 13,00
Baza liter.krestomatio 39,--
De paĝo al paĝo ..... 29,--
Endre Ady ........... 6,--
Bydgoszcz ........... 3,--
Eklegu komencantoj .. 5,--
ABZ de amo .......... 280,--
Enciklopedio de E-o..150,--
Junulara kantareto .. 5,--
Estona soveta poezio. 8,--
Riporto skribita en la pendumila maŝo/fučík/.25,--
Sudbohemiaj burgoj.... 8,50
Kain kaj Abel .........48,--
Kanto super lulilo ... 4,--
Koncize pri MEM ...... 8,--
Kvaropo ..............48,--
La knaboj de P-strato 36,--
La Mastro de Körboja. 5,--
Al abelujo ĝi flugas.. 5,--
Malriĉaj homoj .......12,--
Medailonoj ...........14,--

La perdita vizaĝo ....15,--
Pri la varmo .........21,--
Satiroj ..............31,--
Sileziaj kantoj/poem/ 11,--
Socipolitikaj aspektoj de Esperanto -movado..39,--
Turista kantaro ......20,--
Doktoro E-o kaj ligvo245,--
Lernolibro de Cink .......... 15,--
Lernolibro ABC de Kilián ... 3,--
Vortareto 808 vortoj ....... 2,--
Esperanto en poŝo/do vrecka/ 8,--
poŝatlaso ................. 20,--
PANORAMO -kultura almanako . 16,--
La inĝenia hidalgo donQuijote 350,-
Ĉiela birdo -poemoj ........ 23,--
El la verda biblio ......... 29,--
La morto de la ĉielarko .... 29,--
pola-esper.turista vortareto 5,--
Esperanto de feriadoj ...... 6,--
Esperanto en Perspektivo ...840,--
Apostolo de Libereco ....... 59,--
En maskobalo ............... 29,--
6000 frazeologiaj esprimoj.. 49,--
Hasanagaino ................ 6,--
Historio de E-o 1887 - 1912 24,--
Hungaraj fabeloj ........... 28,--
Kampuĉio la nigraj tagoj ... 10,--
Komenio kaj internacia ling. 4,--
Janusz Korczak ............. 48,--
La filoj de 1. ŝtonkora homo 14,--
La montara krono ........... 40,--
Libro de romanoj ........... 39,--
Lumo de Orienta Eŭropo ..... 5,50
Instrua amuzo .............. 14,--
Metodiko - demandaro ....... 6,--
B.Prus : Pekoj de l'infaneco 20,--
Receptaro de elektitaj mangoj - sudbohemiaj supoj .... 5,--
Sklavoj de dio ............. 45,--
Trigroŝa romano ............ 52,--
Slovaka antologio .......... 34,--
Lingvaj obstakloj .......... 5,--

S T A R T O - nepravidelný věstník Českého esperantského svazu, Jilská 10, 110 00 PRAHA 1, vydávaný pro potřebu členů svazu. Vychází 6 x ročně. Za obsah tohoto čísla odpovídá PhDr Jaromír Jermář CSc a Zdenko Křimský. Grafická úprava M.Labašta.Fotografie Strumínský,Křimský.Tisk zajišťuje Technické ústředí knihoven Praha. Předáno do tisku 22.10.1980. Dohledací pošta Praha 07, snížený poštovní poplatek povolen ředitelstvím pošt Praha pod č.j. P/1 - 1267,ze dne 6. dubna 1979.



Volontula servo multe helpas pri diversaj taskoj en nia sekretariejo. Ankaŭ preparo por distribuado de Starto kaj pluaj gazetoj bezonas multe da zorgema laboro.Kiu volas helpi al nia asocio, volas ĝui amikan atmosferon en nia malgranda kolektiva rondo, aliĝu kaj informu pri detaloj aŭ venu tuj. Kun ĝojo ni vin akceptos.




# KDS


## Sedlčany

KVALITAJ TRANĈ-PRODUKTOJ

Kuirejaj kaj viandistaj tranĉiloj
ĝardenistaj tondiloj de diversaj tipoj
tondiloj por la kureja prilaboro de kortbirdoj
higiena ilaro - ungo-fajliletoj
- raspiletoj por la malmola haŭto

Fabrikas KDS SEDLČANY ĈSSR

Eksportas MERKURIA Praha



## HALTU POR MOMENTO KAJ PENSU PRI VIA SANO

De tago al tago, de jaro al jaro vi senĉese ion kaptas, ĝis maksimumo streĉante la risorton de via sano. Kiel longe vi volas ankoraŭ toleri tion? Pripensu, ke vi havas nur unu sanon - kaj ebligu al ĝi por tre modera prezo tion, kion ĝi meritas : la kompleksan kuracadon en unu el la plej antikvaj kaj rekonataj banlokoj de Eŭropo.

Ĉ E Ĥ O S L O V A K A J   B A N L O K O J
- oazoj de sano, trankvilo kaj inspiro -

KARLOVY VARY
FRANTIŠKOVY LÁZNĚ
MARIÁNSKÉ LÁZNĚ
JÁCHYMOV
TEPLICE V ČECHÁCH
PODĚBRADY
JÁNSKÉ LÁZNĚ - TŘEBOŇ
JESENÍK - LUHAČOVICE
TEPLICE NAD BEČVOU

o o o o o o o o o o o o

BALNEA
PRAHA

**BALNEA**

Reprezentanto
de ĉeĥoslovakaj
banlokoj
kaj kurac-fontoj,
Pařížská třída 11,
110 01 PRAHA 1

ĈEĤOSLOVAKIO

Tx: 122 215